# KOMITATO 19-a de oktobro 2025

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min

Dimanĉon la 19-an de oktobro 2025, de la 10a ĝis la 16a30, kunvenis en la sidejo kaj pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.
[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | R | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | S | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | S | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | R | | | |
| Clément | ROUSSET | CR | Repr. de la membraro | | | X | |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | R | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | | X | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | S | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | | | X | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | X | | BV |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | S | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | S | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | S | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Inès | KAHIN | IK | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | | | X | |

15 ĉeestis el 21, 2 senkulpiĝis, 2 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min

XG prezidas, MP kaj VS protokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**

0.4 **Dato de la venonta kunsido** 4 min

- lundo, 1a de decembro je 20a rete
- sabata laborkunsido 24a de januaro surloke kaj rete
- dimanĉa komitatkunsido 25a de januaro surloke kaj rete

**KOMITATO**
**19-an de oktobro 2025**

---

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Financa raporto 2023/2024.** **DISKUTO** 10 min

**2024** : restas kelkaj operacioj kiujn Sebastien devas prizorgi. La rezulto estos ĉirkaŭ 16000 eŭroj. La lastaj operacioj kiuj estas farotaj ŝanĝos nur de kelkaj centoj da eŭroj.

**2025 :** la stoko ankoraŭ ne estas revizita do ankoraŭ ne estas preciza. Bona rezulto estas antaŭvidita.

**Bilanco kongreso 2025**

Estis profita, 148 partoprenantoj, do profito estos partigita inter Esperanto Nantes kaj Esperanto Francio.

1.2 **Protokolo de la lasta komitatkunsido** **DISKUTO** 5 min

https://docs.google.com/document/d/18bBCBVftndLy0k-WHPGTmxcZGgJP-M51Mhs3I8PHnf4/edit?tab=t.0

Aprobita sen komento

1.3 **Aliĝilo 2025/2026: lokaj kotizoj + donacoj** **INFORMO** 10 min

Estis disdonita papere kaj rete. PDF formo estas disponebla ĉe la reto de Eo Francio.
Pliaj grupoj aldoniĝis al la komuna kotizo-sistemo.
Diskuto okazas pri la statuo de Lorient/Vannes kaj Hennebont. Decido devos veni post kelkaj semajnoj aŭ monatoj de eventuala malapero de la klubo de Vannes.

1.4 **Ludono de la klasĉambro de la sidejo** **DISKUTO** 5 min

Ĉu valorus ion? Ĉu tio alportus monon al la asocio? Tio povus ankaŭ alporti problemojn.
Momente, la sidejo estas iom malorda kaj bezonus iom da ordigo antaŭ ol ludoni.
Kiel deklari impostojn eventuale?
La kialoj de la malordo : donaco de la grupo 94 ne vendeblaj, "apero" de JEFO (materialo uzita dum FESTO), donacoj de diversaj brokantaĵoj.
Ĉio devas esti en ordo en la sidejo. Ni helpos forigi la amasojn de librojn (donaci al kongresanoj, ni sendu al Afriko, ni forĵetu) sed konservi slipojn por statistikoj).
Problemo de la ŝlosilo de la kelo? Atendi post veno de Reĵis, decidi kion meti en la kelo.

<u>Propono</u> : donaco al afrikaj grupoj (en Burundo ekzemple), al brokantoj, Claire (Mousset-Declas ) povas listigi librojn kaj ni povos poste decidi pri la celoj de la diversaj aĵoj kiuj ne estos reprenitaj de protektindaj arkivoj.

1.5 **Nova strategia plano de UEA** **DISKUTO** 15 min

**Prezento de la prezidanto de UEA : Fernando Maia pri strategia plano AKIRI**

- strategia plano de UEA: ne noviga ĉar eĉ se UEA ne havis strategion surpapere, UEA havis strategion. Havi ĝin surpapere ebligas bone komuniki pri ĝi. Antaŭa laborplano estis verkita de Ivo Lapenna. En la praktiko, UEA plu faris tion kion li tiam skribis. Mark Fettes publikigis laborplanon kun 4K por organizi ĉiujn kampojn de UEA ĝis 2017. Duncan refaris mallongan unupaĝan strategian planon kun granda laboro en KIRI (kunlaborado, informado al la ekstera mondo, rilatoj, instruado). Mi ne faris aferon tutnovan sed restrukturis ĝin laŭ AKIRI (aldoni kampon pri administrado). La celo de la dokumento ne estas detaligi la strategion sed konigi ĝin por montri la direkton por la komunumo. Peter Greker diris, faman frazon : misio, vizio, valoroj
- Daŭro de tiu plano estas 5 jaroj (2025-2030) sed kun jara revizio.

- Strategia plano ne devas paroli pri ĉio en la organizaĵo sed difini strategiajn celojn kiuj postulas evoluojn.
- Por gravaj landoj kiel Francio, "plano 1001" ekzemple la 1-an de Decembro aŭ en Januaro. Francio estas inter la plej gravaj landoj en Esperantujo (kun 4 aliaj landoj ink. Germanion).

Ĉu ni adaptu nian propran laborplanon? Legu pli en:
https://uea.org/l/teko/komitataj/AKIRI-Strategia-Plano-de-UEA-2025-2030.pdf

### 1.6. Administrado de la sidejo

Kunveno de la posedantaro devas havi franclingva reprezentanton el la komitato.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Restarigo de laborgrupoj kun lokaj aktivuloj (rete plej ofte) — DISKUTO 10 min

### 2.2 Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : faldfolio, kalendaretoj, nova logotipo — DISKUTO 10 min

- pri faldfolio : multe da komentoj ne taŭgas kun la lasta versio. Tamen, la taŭgaj proponoj povas esti konsideritaj. Kiel labori nun ? Okazigi specialan kunsidon por decidi ĉu ni konservas la ludeton, demandojn, ktp.

  Propono : sendi mesaĝon al la lokaj grupoj pri kiom da ili bezonas kaj ĉu urĝas ?

  Decido : ni bezonus por la edukada salono 21-23-a de Novembro.
- pri la kalendaretoj : la rapida kodo ĉe la kalendaretoj : ĉu tio alportis vizitojn ĉe nia reto ? La celo estas ke la lokaj kluboj povu uzi ĝin kiel vizitkarton.
- pri la nova logotipo. 12 proponoj. Partoprenanta voĉdono por antaŭelekto.

  A 0
  B 5+1
  C 1+2
  D 8+3
  G 2
  E 10+1
  F 0
  H 1
  I 2
  J 1
  K 1

Do la proponoj E,D kaj B (kaj la nuntempa) estos submetitaj al la membroj kaj al la junuloj. Poste la komitato decidos.
Bruno Robineau strekas ke ni bezonas difini la sloganon kaj pri tio, li diras ke LL Zamenhof difinis la lingvon kiel "internacia lingvo".

### 2.3 Lanĉo de trejnad-sesioj: raporto pri hieraŭa laborgrupo — INFORMO 10 min

Pluraj homoj partoprenis la hieraŭan sesion pri sociaj retoj. Interesa prezento de Lulu pri TikTok, Instagram, Facebook kaj graveco specifi la celon: junulojn aŭ maljunulojn, jam esperantistoj aŭ ne kaj diversaj klarigoj pri la maniero komuniki. Ni ĉiam devas esti rekoneblaj laŭ difinita grafika regularo. En Francio, diversaj asocioj uzas diversajn sociajn retejojn.
Propono : koni la komunumon kaj interŝanĝi inter la diversaj uzantoj kaj disdoni la uzatajn ilojn (filmetoj, bildoj…)
Gravas ke sociaj retoj ne estas la fina celo, estas ilo.
Indas pripensi pri pagendaj reklamoj ĉe Facebook Google aŭ Qwant (ekster GAFAM). Eblus kompari la rezultojn inter la diversaj iloj.
Ni disvastigos la registraĵon antaŭ alia sesio.

Plia informo de Michael-Boris : EKC Tuluzo havis volontulinon kiu multe helpis tiktokumi. Ŝi nun serĉus staĝon. Ni devas studi kiel organiziĝi por uzi aŭ ne tiun homon kaj ŝiajn kompetencojn.

### 2.4 Okazinta Homarfesto — INFORMO 10 min

Dek deĵorantoj de la francilia regiono partoprenis, 6000 homoj partoprenis la feston, multe da vizitantoj ĉe la budo kaj disdono de pli ol 1700 kalendaretoj, pli ol 230 eŭroj da vendaĵoj. Pozitiva bilanco.
Raporto disponebla por la komitato. Resuma raporto farita por Esperanto Aktiv.

Por ricevi kreditkartan pagon dank'al Sumup abono de Espéranto-France, eblas uzi saĝtelefonojn kun la aplikaĵo Sumup : https://www.sumup.com/fr-fr/tap-to-pay/

2.5 **Okazonta Salon de l'éducation** INFORMO 10 min

Prezo kiel lasta jaro (sen TVA)

Francilia federacio preparas la praktikan organizadon de la evento. Ni baldaŭ sendos inviton al tuta Francio por inviti deĵorantojn.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 ***Le Monde de l'Espéranto*** DISKUTO 10 min

Rezultoj pri la unuaj kunvenoj de la teamo. Jam estis 2 kunvenoj kun Céline Bernard. Ni povos dungi ŝin por du monatoj da minimuma salajro.
Celo estas havi revuon antaŭ la venonta nacia kongreso (Aprilo). Temo de la revuo estos pri la esperanta movado en Francio do montri la pasintaj gravaj eventoj kaj la venontaj projektoj. Propono estas rigardi, uzi la raporton pri la agado en Belgio farita de Yves Nevelsteen la prezidanto de la Belgia nacia asocio.
La labormetodo estas alvoko al la kontribuantoj.
Claude Bensimon rememorigas ke artikoloj el TAKE povas esti uzataj. Tio ne estis dirita dum la kunvenoj. Tio venos poste.

3.2 **Kongreso 2026** INFORMO 10 min

Traktenda matene por ke RC ĉeestu sed ŝi fakte jam forlasis la renkontiĝon (kunveno forlasita de RC je la 11a30) …. Dankon kaj gratulojn al Bertrand kaj la Herouville Saint Clair klubo. De la 23a ĝis mardo 27 de majo. Salono (spektakla salono uzota dum sabato kaj dimanĉo). Aliaj salonoj eblas de diversaj grandecoj. Por la granda salono, necesos uzi la dungitojn por sekureco kaj tekniko. Ĉefa loko: pôle animation jeunesse.
3 hoteloj en Herouville Saint Clair, junularejo en Caen, aliaj hoteloj apud la "Memorial de Caen".
Busoj kaj tramo funkcias bone.
Vinko, prezidanto de SAT, konsentis doni konferencon pri Lanti (kiu naskiĝis en Normandio).
EF komitatanoj kaj membroj estas invititaj aktive deĵori surloke pro manko de lokaj homfortoj.

3.3 **Kongresoj 2027 kaj 2028** DISKUTO 5 min

En Marsejlo ne estas taŭga loko, ĝis nun. La Ciotat jam serĉadas sed neniu loko vere taŭgas. La datopropono estas de la 8a kaj la 10a de majo 2027.
Por 2028 : Lilo kaj Parizo kandidatiĝas (Parizo ne vere, RC proponis à la Francilia Federacio). .

3.4 **Projektoj pri Arkivoj** INFORMO 5 min

De pluraj jaroj, tiu projekto komenciĝis. La subvenci-peto farita antaŭ la somero estis rifuzita kaj ni sciis tion post iu demando de Pascal Dubourg-Glatigny. PDG sekvas tion kaj proponis ke ni petu subvencion por "dungi" staĝanton por zorgi pri la temo "savprotekto de arkivoj". Venonta kunveno okazos dum novembro por ke naciaj arkivoj prenu aferojn el la sidejo.

3.5 **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** DISKUTO 5 min

- kun naciaj kaj regionaj respondeculoj. Diskutlisto estis preparita de Xavier. La nomo de la listo estas "prelegturneo". Proponi al lokaj aktivuloj.

3.6 **Rilatoj kun la federacioj kaj la lokaj grupoj** DISKUTO 10 min

- 25 ĉinoj kontaktis la francilian federacion kaj esperas esti gastigitaj kaj tranoktigitaj antaŭ iri al Nederlando. Regis kontaktis Alex kaj ne ankoraŭ jesis aŭ neis.
- vizito de iuj brazilanoj al Parizo kaj aliaj urboj el Eŭropo

3.7 **Malfacila situacio de Kvinpetalo, ebla helpo de UFE** DISKUTO 10 min

- vidu mesaĝon de membro de kvinpetalo kun reago de XG

Antaŭ 20 jaroj, Greziljono estis en sama situacio kiel Kvinpetalo. Sed post granda diskuto kaj malfacilaĵo, ili decidis malfermi la lokon al ne-esperanto-parolantoj. La laboroj por renovigi kaj adapti la lokon al publiko-akcepto estis grandegaj. Nun la kastelo kapablas vivi per ĝi mem.

Kvinpetalo ne sekvis la saman vojon. Ili bezonas 12000 eŭrojn ĉiu jaro ŝajne por kompensi deficiton. Sed kio estas la plano, la projekto? Ne multaj novaj okazaĵoj estas anoncitaj.
Kelkaj staĝoj okazas ĉiujare interalie pri tradukado de Brian Moon. Ni sekvos la aferon por helpi laŭ nia kapablo, analizi laŭ ekstera vidpunkto. Estas ankaŭ granda biblioteko kaj libroservo.

3.8 **Ambiciaj projektoj de Greziljono, ebla apogo de UFE** **DISKUTO** 10 min
Evoluo de la loko por kompreni kiuj projektoj eblos post la riparo de la tegmento. Diskuto nun temas pri la pruntopreno ĉu ĉe esperantistoj ĉu ĉe bankoj, por pli modernigi la ĉambrojn por lui la kastelon dum la semajnoj ne nur la semajnofinoj. Unue devas esti instalitaj duŝoj en la ĉambroj por pli komforta restado, ŝanĝi la fenestrojn por pli bone hejtigi la lokon,
EF povus pruntedoni kun interezo pli alta ol niaj uzitaj ŝparkaso.
Ĝis nun la plano ne estas decidita sed ni devas esti pretaj por respondi kiam tia peto aperos.
La sukceso de Greziljono ripozas ĉefe sur la paro Schuman/Huet. Kiel esti certa ke tiu paro estos forta longtempe ? Parto de la nuna studado estas rigardi tiun lastan punkton. Ili faris multe pli da laboro ol iuj profesiuloj. La evoluo nun iras ĉe miksado de profesiuloj kaj aktivuloj.
Veronika Acsàdi estas unu el la pripensitaj dungitoj. Ŝi ankoraŭ ne parolas la francan sed kapablos lerni rapide ĉar jam regas la anglan kaj la italan.

3.**9 Venontaj eldonoj** **INFORMO** 5 min
En aprilo ni publikigis la dulingvan libron "Tri rakontoj. Trois contes", de Flaubert, tradukitan de Thierry Tailhades.

Nuntempe ni laboras pri la eldono de Ĉefaj verkoj de Lukiano (Lucien de Samosate), tradukita de Gerrit Berveling. Tiu verko estos en la serio Oriento-okcidento de UEA. Nuntempe Saïd kontrollegas kaj poste li verkos la antaŭparolon. Se ĉio iĝos glate, ni publikigos la libron je la fino de la jaro 2025.

Paralele ER engaĝiĝas pri  la libro "Anti-grammaire de l'espéranto" de Kris Keyser, kiu estas helpilo por lernantoj. Kiam ĝi estos preta estis bone ke iuj povus kontroli. Renée sin proponis por kontroli librojn do ŝi povos kontroli ĝin. Se estas aliaj spertuloj kiuj ŝatus kontroli, bonvenon al ili. Tamen antaŭe ER devas fini enpaĝigi kaj fakte de pluraj monatoj ŝi ne povis antaŭenigi la aferon. Claude Bensimon konsentas helpi en kontrollegado.

Ni havas ankaŭ 2 aliajn librojn eldonotajn:
"Paradizo", verkita de Said
"La korojn malalten!" (originale "Bas les cœurs !") de Georges Darien, tradukita de Thierry Tailhades.

Emmanuelle emeritiĝis kaj ne plu havas tempon.

3.10 **Albumo de Kris Fredi "La amo protektas nin",** **INFORMO** 5 min
Ĵus aperis la albumo kuneldonata de Espéranto-France kaj Vinilkosmo.

3.11 **Virtuala Kongreso de UEA** **INFORMO** 5 min
6-a Virtuala kongreso de UEA okazos de 4a de decembro al 8a
46 germanoj aliĝis, nur 40 francoj aliĝis
Malpli da programeroj ol kutime sed ankoraŭ estos multaj paralelaj sesioj. Estis propono de la ĉeestantoj havi nur 4 tagodaŭro kaj malpli da programeroj por profiti pli de la prezentantoj.

3.12 **UK 2026 en Graco Aŭstrio** **INFORMO** 5 min
111-a UK, 1-8 aŭgusto simbola nombro
Ekskurso al la muzeo en Vieno estos proponita
Rabata aliĝo daŭros ĝis la 30a de novembro 2025. Kotiztabelo
Organizi (ekz. Telegramgrupon) por karavanoj (aŭ mobicoop).

## 4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj..)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 5 min
FEI ekzamenoj okazos surloke en Greziljono dum “Aŭtunas” kaj poste dum la nacia kongreso en Hérouville Saint Clair.

Renée diris ke ne utilas proponi Eo kursojn dum la kongreso. Ili estis uzitaj en Nanto, do ni devas pripensi. 10 personoj partoprenis en ĉiu kurso. Do en tute, 20 personoj partoprenis. Ni ne scias ĉu tiuj gelernantoj daŭrigas la lernadon iel. Do Bertrand decidis aldoni Eo kursoj dum la venonta nacia kongreso (2026).

**4.2 Metodo 12** INFORMO 5 min

Sub la respondeco de la akademio.

**4.3 MLA stato kaj bezonoj** INFORMO 5 min

La ĉefa problemo estas manko (de efikeco) de varbado de ne-esperantistaj instruistoj. Farita de 60h da lecionoj.

**4.4 Nova retejo "ni legu"** INFORMO 5 min

https://nilegu.esperanto-france.org/
En la retejo, nova servo kreita de AR kaj ER kiu proponas tekstojn kun dinamika vortaro.
Kunlaborantoj bonvenas por novaj tekstoj: trovi tekstojn, laŭtvoĉe legi, traduki, konigi la retejon.

**4.5 Nova propono de Tuluzo pri trejnistoj/instruistoj**

Tuluzo ricevis Erasmus+ subvencion kaj ebligus venigon de trejniston aŭ instruiston de eksterlande.